

**Kluba Programo:****majo:**

- 05 Literatura vespero (ĉe IBIS)
- 12 Prof. John Wells: Lingva Seminario (ĉe DIORAMA) (1800h: konsilantaro)
- 19 Literatura Diskut-vespero (ĉe IBIS)
- 26 David Thornell: Kelkaj Biografietaĵoj pri Donald Trump (ĉe DIORAMA)

**junio:**

- 02 Diskut-vespero (ĉe IBIS)
- 09 Terry Page: Tradukitaj kantoj (ĉe DIORAMA) (1800h: konsilantaro)
- 16 Krucvortenigmoj (ĉe IBIS)
- 23 (\*) Promen-ekskurso tra Hyde Park
- 30 (\*) Diskut-vespero (ĉe IBIS)

**julio:**

- 07 Literatura Diskut-vespero – ĉe IBIS

\* Se pro malbona vetero la promen-ekskurso ne povos okazi la 23an de junio, okazos tiam diskut-vespero ĉe Ibis. Tiaokaze la promen-ekskurso okazos en 30 junio, se taŭgos tiama vespero.

**Esperanta Kalendaro:**

19-21 majo 2017: Brita kaj Skota Kunkongreso, Edinburgo.

<http://britakongreso.org>.

22-29 julio 2017: Universala Kongreso de Esperanto, Seulo, Sud-Koreio. [www.uea.org/kongreso](http://www.uea.org/kongreso)

*Bv. sendi informon al la bultenisto antaŭ 21a junio por mencio en la sekva Kluba Bulteno.*

**Promen-ekskurseto tra Hyde Park / Kensington Gardens**



23-a de Junio se sufiĉe bona vetero 19.00 (Marble Arch) / 19.30 (Hyde Park Corner) Se pluvos, aŭ se meteorologoj estos tiutage prognozintaj daŭran kaj/aŭ fortan pluvon, okazos anstataŭe neformala kunveno en Hotelo Ibis. En kazo duba, bonvolu unue informiĝi telefone ĉe 07541 413989

(aliel la 30-a de Junio 19.00 / 19.30 - anstataŭ la kunveno en Hotelo Ibis)

- 19.00: Renkontiĝu ĉe Speakers Corner. (proksime al stacio Marble Arch). Busoj 2, 6, 7, 10, 16, 23, 30, 36, 73, 74, 82, 94, 98, 113, 137, 148, 159, 274, 390, 414. Necesejoj meze de la trafika karuselego.

- 19.30: Renkontiĝu ĉe Achilles Statue. (proksime al stacio Hyde Park Corner). Busoj 2, 9, 10, 14, 16, 19, 22, 36, 38, 52, 73, 74, 82, 137, 148, 414, C2. Necesejoj je la norda flanko de Knightsbridge.

La promeno finiĝos apud la stacio Queensway (Busoj 70, 94, 148, 390). Notu ke la stacio Lancaster Gate (Busoj 46, 94, 148, 274, 390) estas fermita ĝis julio pro renoviĝoj



## Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere, en iu el du lokoj:  
Diorama Arts Studios, 201 Drummond Street,  
NW1 3FE (por kunveno kun programo);  
Hotel Ibis, 3 Cardington Street, NW1 2LW (por  
babilvespero)

Kutima programo ĉe Dioramo:


18:00 malfermiĝo kaj bonvenigoj

19:15 - 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero

20:15 - 20:45 paŭzo

20:45 - 22:00 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la  
ĉefprogramero

22:00 fino



Loko:

Metrostacio: Euston, Warren St (Victoria linio)  
Euston Square (Circle linio)

Fervojo London Overground: Euston

Busoj: 10, 14, 18, 24, 27, 29, 30, 73, 88, 134, 205,  
390; krome: 453, C2 (Dioramo); 59, 68, 91, 168,  
253, 476 (Ibis).

Kotizoj: £10 jare; fora membro: £6 jare.

Kluba retejo:

<http://www.esperanto.org.uk/lek/lek.htm>

Lokaj grupoj: Kingston: Roy Cliffe 020-8397 5895;

Orientlondono: Roy Simmons 01473-461346

rokeby@globalnet.co.uk; Sudlondono: Gregory Porilo  
020-8672 8095 esperanto-sleg@tiscali.co.uk.

Federacioj: Orienta: Roy Simmons (vidu supre);

Sudorienta: Kevin Murray, 11 Leybourne Ave, West  
Byfleet, Surrey KT14 7HB 01932-345779  
yarrump@gmail.com.

Funkciuloj: Honora Prezidanto: Marjorie Boulton; Honora Vicprezidanto: Heleno Fantom;

Konsilantaro: David Thornell (Prezidanto kaj Sekretario), Matt Peperell (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Renato Corsetti, Roland England, Stan Keable, Chris Lewis, Anna Lowenstein, Terry Page Antony Rawlinson (Bultenisto).

Adresoj: David Thornell: lek.sekretario@gmail.com; Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ

ap\_esp-lek21@yahoo.co.uk, Anica Page: 7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP anica\_page@btinternet.com,

Antony Rawlinson: 5 Thorpe Crescent E17 5BY acj.rawlinson@ntlworld.com.

## Letero de nia Prezidanto

Karaj Klubanoj:

Jen iuj menciindaĵoj.

Unue, La Londona Esperanto-Klubo bonvenigas al sia Konsilantaro S-ron CHRIS LEWIS. Gratulon al Chris, kies entuziasmo ĉiam plibonigas la etoson de niaj kunvenoj. Gratulon ankaŭ al MATT PEPERELL, kiu elektigis Vic-Prezidanto.

Due, mi danku profunde al TERRY PAGE, kiu glate kaj lerte prezidis la Jarkunsidon. Terry faris ne nur tion, sed multon pli: Li servis sindoneme dum longa tempo, kiel Vic-Prezidanto de LEK. Tiom da laboro, tiom da jaroj! Bonege, ke li restas inter la Konsilantoj.

Trie, vizitis nin lastatempe MARIANNE DUNLOP, post vojaĝo al Norda Koreujo. Ŝi dividis grandajn kaj gravajn sciojn pri kaj la historio kaj la nuna situacio tie, per eleganta klareco. (Marianne estas lingvisto pri la ĉina kaj rusa lingvoj, kaj kunaŭtorino de Sovetunio - Dudek Jarojn Poste).

Kvare, la nova kurso de klasĉambraj lecionoj ĉe Diorama pruviĝas sukcesa, danke al la instruado de ANNA LOWENSTEIN kaj LENIO MAROBIN. Ĉeestas ne nur lernantoj, kiuj fakte montriĝis progresantoj (eklerninte per interreto); observantoj ankaŭ venas kaj raportas favore, pri ĉio.

Kvine, planu partopreni nian ĉi-jaran promenon! LEK ja ĝuas tradicion piedvagi tra la plej interesaj partoj de Londono. Vi mem aliĝu al tiu tradicio, por ekzercado, sociumado, babilado, aktiva lernado ktp. Samideanoj atendas vin!

Sincere,

*David Thornell*

